O nein, es sind zehn Gebote, um Organisationen zu zerstören.

Was! Nee! So'n Quatsch! Wenn ich schon „Organisation" hör' . . . !

Ich beruhigte. Karl soll mal endlich laut lesen!

1. *Besuche keine Mitgliederversammlungen.*
   Schweigen.
2. *Wenn du aber kommst, dann komme zu spät.*
   Der Groschen beginnt langsam zu fallen.
3. *Wird eine Versammlung vorbereitet, so erkläre die vorbereitenden Arbeiten des Vorstandes und der andern Mitglieder für verkehrt.*

Helga: Halt mal nen Augenblick, ich hab' eine Idee.

Karl: Ach sieh mal an!

Hella: Sei doch nicht so häßlich zu Helga! Du bist sonst nicht so.

Wir andern: Laßt sie doch mal reden, Helga hat Köpfchen.

Helga: Ich finde diese zehn Gebote, von denen ich bisher nur drei kenne, sehr amüsant. Es kam mir gerade der Gedanke: Sollten wir nicht versuchen, sie gleich in Esperanto zu übertragen? Seit wir zusammen den Fortbildungskursus besuchen, sind wir ja schon beinahe eminentuloj.

Hella: Ich bin dabei, aber Ihr wißt, ich bin noch ein bißchen schwach auf der Brust. Wer hilft mir bei Nr. 1?

Franz: Na, fang mal an. Da gibt's doch überhaupt keine Schwierigkeit!

Ja, Du Sprachgelehrter, Du bist ein großes Licht, ich bin nur ein Flämmchen. Aber trotzdem: *Ne vizitu membrokunvenon!*

Karl: Großartig! Aber doch nicht ganz prima.

Hella: Ja natürlich: *membrokunvenojn.*

Helga: Und mir gefällt das *vizitu* nicht ganz. Ich möchte lieber *partoprenu* vorschlagen.

Franz: Wie gesagt: Helga hat Köpfchen. Ich finde *partoprenu* auch viel besser, obwohl *vizitu* ganz in Ordnung ist. Es ist mehr eine Sache des Gefühls.

Karl: Du hast recht und darfst jetzt das zweite Gebot übersetzen.

Se vi sed venas, tiam . . .

Helga und Hella: Hör auf, das geht einem ja auf die Nerven!

Franz: Guckt mal an, unsere Zartbesaiteten. Aber ich muß Euch loben, ich hab das nämlich absichtlich gemacht mit dem *„sed"*. Es steht natürlich nur zu Beginn eines Satzes am richtigen Platz.

Karl: Und der Nachsatz?

Tiam venu tro malfrue. Sind alle damit einverstanden?

Karl: Hm. *Tiam* könnte wegbleiben.

Franz: Gut. Sonst noch was?

Helga: Ich würde einfach sagen: *malfruiĝu.*

Hella: Ich bewundere Dich, Helga! Du hast ein Händchen dafür.

Helga: Der eine sagt, ich hätte Köpfchen, die andere meint, ich hätte Händchen; was sonst noch?

Karl: Stürze Dich mal aufs dritte Gebot.

Helga: Ach, Du willst mich wohl aufs Glatteis führen? Da mußt Du schon früher aufstehen. Also: *Post preparo de kunveno . . .*

Franz: Ist das nicht reichlich frei übersetzt?

Hella: Ich würde sagen: *Se kunveno estas preparata . . .*

Karl: Schön, und noch besser wäre *kiam . . .* Aber am besten gefällt mir doch die kurze knappe Form von Helga.

— — — — — — — — — —

Ich hatte keine Zeit mehr zuzuhören, obwohl mich das alles mächtig interessierte. Drum überlas ich noch schnell die andern Gebote:

4. *Sabotiere die Vereinsarbeit.*
5. *Nimm nie ein Amt an, da es leichter ist zu kritisieren, als selbst Arbeit zu leisten*
6. *Sei gekränkt, wenn du zur Mitarbeit nicht aufgefordert wirst. Ist dies aber der Fall, so gehe nicht zu den Sitzungen.*
7. *Wenn der Vorsitzende dich um deine Meinung fragt, so sage, du habest nichts zu bemerken. Nachher erzähle allen, wie es hätte gemacht werden müssen.*
8. *Tue gar nichts oder nur das absolut Notwendige; wenn aber andere Mitglieder selbstlos Zeit und Arbeit für die Sache einsetzen, so klage über Cliquenwirtschaft und Bonzentum.*
9. *Bezahle deine Beiträge möglichst spät oder überhaupt nicht.*
10. *Kümmere dich möglichst wenig um Werbung neuer Mitglieder.*

Dann sagte ich heuchlerisch: Kinder, ich muß mal schnell zur Post, macht doch mittlerweile weiter.

Sie hörten kaum zu, so fest steckten sie in ihrer Arbeit drin.

———

Nun, meine verehrten Leser und Leserinnen, Sie möchten wohl wissen, wie das vierblättrige Kleeblatt sich weiter mit den zehn Geboten unterhalten hat? Nein, ich verrate heute noch nichts. Nächstes Mal soll das Ergebnis der vereinten Bemühungen hier gedruckt erscheinen.

Aber jetzt hab ich eine Idee: Versuchen Sie's doch selbst auch mal, zu eint, zu zweit, zu dritt oder meinetwegen auch eine ganze Klasse zusammen. Schicken Sie bitte ihre Bemerkungen, aber auch ihre Zweifel und Fragen an die Redaktion für diese Seite, für I h r e Seite. Dann braucht sich die Schriftleitung nicht mehr selbst den Kopf zerbrechen und esperantistische Personen erfinden. Die Redaktion ist im übrigen fest davon überzeugt, daß es die Hellas und Helgas und Karls und (Franzs? sagen wir lieber) Franzen unter Ihnen massenhaft gibt. Sie mögen auf den Plan treten!

ĈI TIUN PAĜON VERKAS NUR NIAJ ESTIMATAJ GEABONANTOJ

Esperanto im täglichen Gebrauch

Proben aus dem Sprachführer von Wilhelm und Hans Wingen

ESPERANTO IN DER TASCHE

Allgemeine Redewendungen

Fragen:

Gestatten Sie, mein Herr?
Worum handelt es sich?
Wie, bitte? (Wie beliebt?)
Nicht wahr?
Was wollten Sie sagen?
Was halten Sie davon?
Was sagen Sie dazu?
Wie denken Sie darüber?
Was meinen Sie damit?
Wie kommt das?
Wie erklären Sie sich das?
Was gibt es Neues?
Was ist geschehen (was gibt's)?
Woher wissen Sie das?
Darf ich mir eine Frage erlauben?

Würden Sie mir einen Gefallen tun?
Was raten Sie mir?

Generalaj parolturnoj

Demandoj:

Ĉu vi permesas, sinjoro?
Pri kio temas?
Kion vi diris?
Ĉu ne (vere)?
Kion vi volis diri?
Kion vi opinias pri tio?
Kion vi diras pri tio?
Kiel vi pensas pri tio?
Kion vi volas diri per tio?
Kio estas la kaŭzo?
Kiel vi klarigas tion al vi?
Kio nova?
Kio okazis?
De kiu (kie) vi scias tion?
Ĉu mi rajtas permesi al mi demandon?
Ĉu vi farus al mi komplezon?
Kion vi konsilas al mi?

Gaststätte. Frühstück

Verzeihung! Ist dieser Stuhl frei?
Nein, der Platz ist besetzt!
Gehen wir dorthin, in die Ecke!
Wir wollen den Mantel ablegen!
Haben Sie schon gefrühstückt?
Noch nicht; ich bin hungrig.
Ich habe (großen) Durst.
Was sollen wir trinken?
Ich bestelle ein Glas Bier.
Wer bedient hier?
Bringen Sie mir eine Tasse Kaffee! (Mit Milch, Zucker, Sahne).
Ich nehme Bouillon mit Ei.
Kognak, Likör, Mineralwasser.
Schokolade, Tee.
Ein Brötchen mit Käse, Wurst.
Ein Schnittchen Schinken, Lachs.

Restoracio. Matenmanĝo

Pardonu! Ĉu tiu ĉi seĝo estas libera?
Ne, la sidloko estas okupita!
Ni iru tien, en la angulon!
Ni demetu la mantelon!
Ĉu vi jam matenmanĝis?
Ankoraŭ ne; mi estas malsata.
Mi havas (grandan) soifon.
Kion ni trinku?
Mi mendos glason da biero.
Kiu servas ĉi tie?
Alportu al mi tason da kafo! (Kun lakto, sukero, kremo).
Mi prenos buljonon kun ovo.
Konjako, likvoro, mineralakvo.
Ĉokolado, teo.
Bulko kun fromaĝo, kolbaso.
Tranĉaĵo kun ŝinko, salmo.

Verabredungen

Wann kann ich Sie wiedersehen?
Wo kann ich Sie treffen?
Ich erwarte Sie an (bei)...
Paßt Ihnen die Zeit?
Lieber etwas früher (später).
Darf ich Sie einladen (zum Theater, zum Konzert, zum Tanz)?
Ich muß leider ablehnen.
Ich bin verhindert.
Sind Sie morgen abend frei?
Darf ich mich anschließen?
Soll ich Sie abholen?
Ich rufe Sie vorher an.
Bitte, besuchen Sie uns!
Ich kann es nicht versprechen.
Wenn es irgend möglich ist, ...
Kommen Sie bitte pünktlich.
Je früher, desto besser.

Antaŭfiksoj, rendevuoj

Kiam mi povos revidi vin?
Kie mi povos renkonti vin?
Mi atendos vin ĉe la...
Ĉu la horo konvenas al vi?
Prefere iom pli (mal)frue.
Ĉu mi rajtas inviti vin (al teatro, al koncerto, al dancado)?
Bedaŭrinde mi devas malakcepti.
Mi estas malhelpita.
Ĉu vi estos libera morgaŭ vespere?
Ĉu mi rajtas aliĝi?
Ĉu mi venu por akompani vin?
Mi telefonos al vi antaŭe.
Vizitu nin, mi petas!
Mi ne povas promesi.
Se estas iel eble, ...
Bonvolu veni akurate.
Ju pli frue, des pli bone.

Rundfunk

Ich höre abends gern Radio.
Haben Sie einen guten Empfänger?
Ein Vierröhrengerät, Super(het).
Stellen Sie bitte mal an!
Stellen Sie einen anderen Sender ein!
Schalter, an-, um-, abschalten.
Lange, mittlere, kurze Wellen.
Hochfrequenz. Antenne, Erde.
Stecker, Steckdose, Drehknopf.
Skala; Rückkopplung.
Trennscharf, Störung, Schwund.
Lautsprecher, klangschön, Zimmerlautstärke.
Senden, Nachrichten, Fernsehen.

Radio(fonio):

Mi ŝatas aŭskulti radion vespere.
Ĉu vi havas bonan ricevilon?
Kvarvalvan ricevilon, superheton.
Bonvolu funkciigi ĝin!
Elektu alian sendstacion!

Konektilo, konekti, ali-, malkonekti.
Longaj, mez-, mallongaj ondoj.
Alta frekvenco. Anteno, terkonekto
Stopilo, ŝtopilingo, turnilo, Skalo, reakcio.
Selektiva, perturbo, fado.
Laŭtparolilo, belsona, laŭteco por ĉambro.
(Dis)sendi, informoj. Radiovidado.

Lingva Angulo

Domaĝo

Domaĝo — domaĝi gehört erfahrungsgemäß zu den oft mißverstandenen Wörtern, weil nicht alle Wörterbücher die richtige Erklärung geben. Infolgedessen wird z. B. domaĝi fast nie gebraucht oder falsch. Man begnügt sich mit „estas domaĝe = es ist schade, bedauerlich". — Dr. Zamenhof, der anfangs zwar selbst domaĝ' mehrere Bedeutungen zuwies, gab im Jahre 1907 folgende Erklärung ab (wörtlich): Domaĝo ne havas la sencon de malprofito. La efektiva signifo de la Esperanta „domaĝi" estas proksimume: ne voli elspezi, ne voli perdi, ne voli difekti. Ekz.: Li ne volis aĉeti libron, ĉar li domaĝis la monon. (**Anm.** d. h.: weil ihm für ein Buch das Geld zu schade war und er keins ausgeben wollte); li ne eliris en la pluva vetero, ĉar li domaĝis sian veston. (**Anm.** d. h.: weil ihm sein Anzug, den er nicht verderben wollte, zu schade war); li forkuris de la batalo, ĉar li domaĝis sian vivon. (**Anm.** d. h.: weil er sein Leben, das ihm lieb war, nicht verlieren wollte). Iafoje, la senco de „domaĝo" estas tre proksima al la senco de „bedaŭro", ekz. „Kia domaĝo! = Kiel bedaŭrinde! = Kia perdo (aŭ difekto), kiun mi ne volus havi!" — Ich füge noch ein diesbezügliches Sprichwort Dr. Zamenhofs hinzu: Kiu domaĝas groŝon, perdas la tutan poŝon = Wem ein Groschen zu schade ist, um ausgegeben zu werden, der wird all sein Geld verlieren. — Es ist folglich nicht richtig zu sagen: La hajlo kaŭzis grandan domaĝon — oder — la incendio multe domaĝis mian domon.

M. Butin, Godesberg.

Übersetzung der Übersetzungs-Aufgabe Nr. 12:

Kio min igis esperantisto

Trairante la vastajn laborejojn de nia fabriko, mi kutimas paroli kun niaj gelaboristoj kaj interesiĝi pri iliaj aferoj.

Unu fojon, dum paŭzo, mi vidis laboristinon, certe ne estantan kapabla majstri ian ajn iom grandan taskon, sed tamen diligenta kaj respondeca. Ŝi havis antaŭ si libron.

Mi demandis: „Do, kion vi legas?"
Ŝi: „Mi ne legas."
Mi, mirigite: „Nu?!"
Ŝi: „Mi studas."
Mi, ridetante: „Kaj kion?"
Kaj ŝi, tutsincere: „Esperanton, sinjoro."

Nun mi vere ridis kaj ŝin demandis: „Ĉu vi fakte kredas, ke vi iam povos akiri la tutan mondon per via lingva kreaĵo? ... Vi ja ne konas la mondon. ... Neniam ..." Mi ne sciis, kiel klarigi al ŝi la sensencaĵon.

Sed ŝi trankvile kaj konscie respondis: „Tio min tute ne tuŝas, estimata sinjoro, mi scias, ke Esperanto estas bona afero, inda por subteno, tial mi ĝin studas. Ne interesas min, kion faras la aliaj."

Kion kontraŭdiri?

Mi ekinteresiĝis pri la lingvo, enrigardis unuan libron, kaj esperantistiĝis.

Laŭ C mor.

La knabino kun kiu la infanoj ne rajtis interrilati

Komenco de la konata romano de Irmgard Keun

Tradukita de Jofebo

Unua rakonto

Mia unua testamento

Miaj gepatroj staras ĉiam sur la flanko de miaj instruistinoj, kaj tial mi iris tuj post lecionfino al sinjoro Kleinerz (pr. Klajnerc) apude kaj rakontis al li ĉiom.

Tiu sinjoro Kleinerz estas jam maljuna, minimume 40-jara, kaj tial li mem jam ne povas havi infanojn. Ili diras, ke mia patro min enmondigis. Mi ne scias, kiel li faris tion, sed mi ja kredas, ke estas vere terure malfacile tion simple scipovi, kaj mia patro estas admirinda. Sed kie mi efektive estis antaŭe?

Edzinon sinjoro Kleinerz jam ne havas. Mia patrino diris: tion li ne meritas pro tiu virino, kaj ŝi ankoraŭ faris, tutlaste, ŝuldojn je lia nomo.

Li permesas al mi ĉiam veni al li en la ĝardenon, tie kelkfoje birdetoj falas el nesto. Ilin ni poste flegas kaj vartas, sed preskaŭ ĉiam ili mortas, ĉar ili havas internan vundiĝon kaj deziras esti ĉe siaj gepatroj kaj pepetas, ĝis ili estas mortaj. Estas terure malgaja afero pri la malgrandaj birdoj, sed ĵus ni sukcesis savi turdon.

Mi ĉiam interkonsiliĝas kun sinjoro Kleinerz, mia patro ofte lin konsultas pro impostoj. Sinjoro Kleinerz diris al mi: homo devas esti bona, sed li ne bezonas toleri, ke oni lin traktadu kiel stultulon. Mi rakontis al li ĉiom pri fraŭlino Scherwelbein (pr. Ŝervelbajn) — kaj kiam sabaton estos la enterigo, li invitu miajn gepatrojn kaj ankaŭ onklinon Millie (pr. Mili), por ke ili ne iru al la tombejo de Melaten*) kaj vidu, ke mi kiel sola de la tuta lernejo ne ĉeestos.

Mi vere ne scias, kiel ĉio okazis kaj kial. Unue forveturis la ĝustetaŭga tramo, kaj tiukaze mi ĉiam venas tro malfrue en la lernejon. Mi tuj miris jam en la koridoro, aŭdante la bruon en la klasĉambro, ĉar estis jam 10 post la oka. Interne ankoraŭ ne estis instruistino, kaj tial ankaŭ mi kunfaris iom da bruo. Sed ne multe. Mi nur metis sur la hararon de la aĉa Trautchen Meiser (pr. Traŭthen Majzr = Gertrunjo M.) tre malmultajn lapojn, kiujn mi ĉiam devas porti ĉe mi. Ĉar Trautchen kutimas min fianonci kaj ne rajtas rilati kun mi, tial ke mi vivas en grava malamikeco kun ŝia patrino.

Mia amikino Elli Puckbaum (pr. Pukbaŭm) laŭte ekridis, kaj Trautchen ekkriaĉis — jen envenis fraŭlino Knoll, nia klas-instruistino. Ĉio silentiĝis, la hararo de Trautchen estis plena de lapoj kaj la okuloj de fraŭlino Knoll estis ruĝaj. Kvazaŭ iu tranĉilo iĝus tra mia ventro, tiel mi ektimiĝis kaj tute varmegiĝis en la vizaĝo kaj sentis ĝenon, ĉar fraŭlino Knoll estis plorinta. Mi ne povas rigardi, kiam plenkreskintoj ploras. Io terura tiam estas en la mondo, ĉar ili ja ploras preskaŭ neniam.

La nazo de fraŭlino Knoll estis ruĝa kaj ŝvelinta, kaj ŝia voĉo ankaŭ: „Knabinoj, io senlime malĝoja okazis — nia kare estimata direktorino, nia ĝenerale tiel alte ŝatata fraŭlino Scherwelbein mortis." Tiam ŝi aertiris tra la nazo tiel, kiel mi neniam rajtas fari ĉetable, kaj poste ĉio estis mallaŭta, kaj poste kelkaj infaninoj ĵetegis siajn brakojn sur la pupitrojn kaj la kapojn ankaŭ, ekplorante tiel, ke oni aŭdis tion. Antaŭ mi Trautchen tremis per la ŝultroj, kaj la lapoj en ŝiaj haroj balanciĝis.

„Knabinoj, kompatindaj knabinoj", diris fraŭlino Knoll, „rekonsciiĝu!" Kaj eksingultis. Estis terure. Mi volis fari ankaŭ ion kaj mansignis kaj demandis: „Je kio do ŝi mortis?" Ĉar mi vere ofte aŭdis, ke oni demandas tiel en tiaj okazoj kaj estis vere nur bonintenca. Sed jen fraŭlino Knoll tuj respondis, ke mi estas maldelikata infano, kaj ke en miaj okuloj ne estas larmoj. Kaj mi nur unu fojon pripensu, ke de nun mi ne plu vidos en mia tuta vivo fraŭlinon Scherwelbein. „Knabinoj, vin tuŝas nun la majesto de la Morto, vi ĉiuj neniam plu revidos en via vivo fraŭlinon Scherwelbein."

Nun denove kelkaj infaninoj ekploregis tra la klasĉambro kaj mi vere ekhavis anseran haŭton sur la brakoj kaj povis diri nur tute mallaŭte: „Sed mi entute ĝis nun ne vidis ŝin." Tio nome estas vera. Ĉar ni estas apenaŭ tria-klasaninoj, kaj fraŭlino Scherwelbein estis terure maljuna kaj malsana jam delonge, kaj ni konas nur ŝian anstataŭantinon fraŭlinon Schnei (pr. Ŝnai). Nur Elli iam vidis fraŭlinon Scherwelbein — laŭdire kun bastono ŝi iris kaj havis vitrecajn okulojn kaj balancis la kapon. Mi ekpensis pri nia ŝciuro kiu mortis. Estis tiel bela kiel sorĉaĵo el brilanta bildlibro, kaj tiel gaja ĝi estis kaj gimnastikis en miaj haroj, kaj jen, iumatene ĝi subite estis mortinta, ĉar ĝi manĝis kopikrajonajon de sur la patra skribotablo. Ankaŭ mi iom mortiĝis, kaj nia loĝejo estis tute ŝanĝita kaj nenio plu estis vere bela.

Mi ekpensis ankaŭ pri Lappes Marjenn, kiu kolektadas ĉifonojn kaj ankaŭ estas tre maljuna kaj balancas la kapon, kaj ke ni ĉiam ŝin protektas, de kiam Hänschen Lachs (pr. Henshen Lahs = Johanĉjo L.) fondis la „hordon de la furiaj banditoj".

Kiam mi nun pensis pri mia ŝciureto kaj ke Lappes Marjenn eble mortos ankaŭ baldaŭ, mi preskaŭege ekploris — sed jen ekkriis fraŭlino Knoll: „Fi, infanino, fi!" Kaj mi hontu kaj pentu. Kaj poste demandis: „Ĉu vi nun hontas? Ĉu vi nun estas malgaja?"

Ĉiuj knabinoj ĉesis plori, ĉiuj min rigardis forte spirante. Mi ja promesis al mia patrino, ke mi ne plu enlasos en min la diablon de furiozo. Sed kiam ĉiuj min rigardaĉis tiel naŭze, jen tute ardanta diablo de furiozo enpenetris min, kaj mi volis tion kaj piedbategis kaj kriis: „Mi ne hontas, mi ne estas malgaja, mi ne hontas."

*) Malnova tombejo de Kolonjo.

El Hamleto

ADMONOJ de Laerto al Ofelio

Evitu flaman mezon de la amo,
Atakon kaj atencon de deziro!

Knabin' plej ĉasta perdis jam modeston,
Se al la lun' ŝi montris sian ĉarmon.

Tim' donas garantion.
Por la juneco ĉie staras retoj.

Eĉ virto ne evitas kalumnion.

L' infanojn de printempo ofte mordas
La verm' ankoraŭ en la burĝoneco,
Kaj al la frua roso de juneco
Spiret' venena estas plej danĝera.

(El: Hamleto, I, 3)

ADMONOJ de Polonio al Laerto

Laŭ via mon' mezuru vian veston.
Sed ĉio estu takta kaj konvena;
Vin vestu bone, sed ne kiel dando:
Laŭ vest' ekkonas oni ofte viron.

Vi gardu vin de ĉia malpaciĝo;
Se vi ĝin ne evitos — tiam agu
Fortike, ke la malamik' vin timu!

Ne ĉian penson metu sur la langon.
Ne donu tuj al ĉia penso faron!

Al ĉiu servu per orelo via,
Sed ne al ĉiu servu per la buŝo!

Konsilojn ĉiam prenu vi de ĉiu,
Sed propran juĝon en la kapo tenu!

Afabla estu, sed ne tro kredema!

Al la amiko saĝe elektita
Kunforĝu vin en fera fideleco,
Sed gardu vian manon de la premo
De ĉiu renkontota bona frato!

Ne prenu prunte kaj ne prunte donu!
Per pruntedono ofte oni perdas
Krom sia havo ankaŭ la amikon,
Kaj pruntepren' kondukas al ruino
De la mastraĵo.

Antaŭ ĉio estu
Fidela al vi mem! De tio sekvos,
Ke vi ne estos ankaŭ malfidela
Al la aliaj homoj.

(El: Hamleto, I, 3)

Grajno da malbono
Por la okul' de l' mondo ofte kovras
La tutan indon de plej bona homo.

(El: Hamleto, I, 4)

Ĉiuj infaninoj rajtas iri sabaton posttagmeze en ordita procesio al la enterigo, kaj ili devos porti blankajn vestojn kun nigraj skarpoj kaj ricevos bukedon da blankaj rozoj por la manoj. Nur mi ne rajtas kuniri, ĉar mi krimis vizaĝe al la morto.

(Finota.)

ŜERCO - LUDO - BONHUMORO

Esperanto-Größen ohne Familiennamen.

Auch in der Esperanto-Bewegung gibt es mehr oder weniger hervorragende Personen, die ein jeder Esperantist kennt. Ja, man kennt sie sogar so gut, daß man nur ihren Vornamen zu hören oder zu lesen braucht, um gleich zu wissen, wer gemeint ist. Wer zu den folgenden Namen mehr als die Hälfte der Familiennamen hinzufügen kann, darf sich rühmen, in der Esperanto-Geschichte immerhin nicht unbeschlagen zu sein.

1. Ludwig Lazarus . . . . . .
2. Antoni . . . . . .
3. Kazimierz . . . . . .
4. Edmond . . . . . .
5. Teo . . . . . .
6. Théophile . . . . . .
7. Raymond . . . . . .
8. Norbert . . . . . .
9. Siegfried . . . . . .
10. Andreo . . . . . .
11. Julio . . . . . .
12. Julia . . . . . .
13. Felikso . . . . . .
14. Leono . . . . . .
15. Lidja . . . . . .
16. Robert . . . . . .
17. Emma . . . . . .
18. Kolomano . . . . . .
19. Jean . . . . . .
20. Stellan . . . . . .

Wer will die Nüsse knacken?

Silabenigmo

Aus den folgenden 31 Silben sind 12 Wörter zu bilden. Mit Ausnahme von Nr. 8 sind es lauter Esperanto-Wörter. Ihre ersten und dritten Buchstaben ergeben, von oben nach unten gelesen, ein Esperanto-Sprichwort, das ein genaues deutsches Gegenstück hat.

an — bo — ci — do — dro — en his — i — i — jeep — ka — ke — ko — kro — ma — no — o — o — o — on — po — pu — ro — ru — se — to — to — tra — tri — zi —zo.

Die gefundenen Wörter bedeuten: 1. Nagetier mit Stacheln, 2. Erscheinungsform des Wassers, 3. Futterpflanze, 4. Widerstand, Widerspruch, 5. kosmetischer Artikel, 6. zertrümmerter Bau, 7. Farbe, 8. Alliiertes Militärfahrzeug, 9. Rundfrage, 10. Haustier, 11. behauenes Holzstück, 12. schmackhaftes Federvieh.

Besuchskartenrätsel

St. Rokeleit

STALINO

Welchen Beruf hat Herr Rokeleit? Es ist ein Esperanto-Wort, aber auch sonst ohne weiteres verständlich.

Certa sanigilo

A. Hodiaŭ mi estis ĉe kuracisto pro la daŭra malpliboniĝo de mia memoro.
B. Kion faris la kurcisto?
A. Li postulis antaŭpagon.

Sicheres Heilmittel

A. Heute war ich beim Arzt wegen der dauernden Verschlechterung meines Gedächtnisses.
B. Was machte der Arzt?
A. Er verlangte Vorauszahlung.

*

Inter bankistoj

— Mi petas, kara kolego, bonvolu eksidi.
— Dankon, mi sidis tri monatojn, kaj tio sufiĉas.

Unter Bankiers

— Ich bitte, lieber Kollege, setzen Sie sich gefälligst!
— Danke, ich habe drei Monate gesessen, und das genügt.

*

Kial bankejoj havas kradfenestrojn?
— Por ke la direktoroj alkutimiĝu al ilia aspekto.

— Warum haben Bankhäuser Gitterfenster?
— Damit sich die Direktoren an ihren Anblick gewöhnen.

*

Stelisto antaŭ juĝisto

Juĝisto: Kial vi forprenis nur la komercaĵojn kaj lasis la monon?
Akuzito: Vi ankaŭ riproĉas tion al mi, kiel mia edzino.

Ein Dieb vor dem Richter

Richter: Warum haben Sie nur die Waren genommen und das Geld zurückgelassen?
Angeklagter: Auch Sie werfen mir das vor, wie meine Frau.

*

En restoracio

— He, mastro! Tiu ĉi vianda supo estas tre malbongusta, kaj escepte de du fingroj de l' kelnero, en ĝi estis eĉ ne unu peco da viando.

In einer Wirtschaft

— He, Wirt, diese Fleischsuppe ist sehr schlecht von Geschmack, und mit Ausnahme von zwei Fingern des Kellners war in ihr auch nicht ein Stück Fleisch.

*

LÖSUNGEN DER RÄTSEL AUS NR. 11/12

Zusatzrätsel

IN-fero — NA-turo — VO-lumo — IN-vento — TA-peto — OR-doni — AN-anaso — LE-tero — CE-valo — IM-agi — EM-ailo — LA-ringo — OB-servi — = INVITO AL CIELO.

Enigma matematiko

A) KONG-o B) RE-lo C) S-ag-O x) KONGRESO.

Vortara tragedio

Gladi — glano — glando — glaso — glata — glavo — gliti — globo.

Für die Werbung zu den nächsten Kursen

empfehlen wir das FLUGBLATT

Esperanto auf einem Blatt

Ein Flugblatt, 27 × 36 cm groß, das schon auf eine lange Verwendung zurückblicken kann und jetzt, neu zusammengestellt von dem bekannten Lehrbuchverfasser Wilhelm Wingen in Köln, von neuem helfen soll, Interessenten und Anhänger für unsere Idee zu werben. Es enthält auf zwei Seiten eine kurze Einführung in die Welthilfssprache, die gesamte Grammatik, eine Textprobe mit Übersetzung und eine über 1000 Stämme umfassende Liste aller wichtigen Wörter. Wir hoffen, daß das Blatt den Beifall aller tätigen Esperantisten findet und überall für die Werbung bei Tagungen, Gruppen-Zusammenkünften und vor allem für Kursusvorbereitungen verwendet wird. Der Preis ist so niedrig wie möglich gehalten, und wenn es schnellen Absatz findet, wird er weiter herabgesetzt.

Je Stück 5 Pfennig

Ein Lehrbuch für Esperanto wie es sein muß

Wir lernen Esperanto

Format Din A 5, 64 Seiten Umfang. 2,50 DM, bei 10 Stück Lieferung von 11.

Wer ein gediegenes Lehrbuch sucht, greift zu diesem Unterrichtsmittel. Der gut durchdachte lückenlose Aufbau, die klare Regelfassung und der praktische Übungsstoff machen das Buch für Lehrgänge und zum Selbstunterricht besonders geeignet. Immer wieder gehen uns von erfahrenen Sprachfreunden unaufgefordert anerkennende Beurteilungen zu.

Demnächst erscheint

Esperanto in der Tasche

Ein Sprachführer für den Gebrauch unserer Sprache im täglichen Leben von W. u. H. Wingen, Köln.

Bitte beachten Sie unsere weiteren Ankündigungen!

Esperanto-Abteilung Limburger Vereinsdruckerei
Limburg/Lahn

Verlag und Druck: Esperanto-Abteilung der Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg/Lahn. Hauptschriftleiter: Joseph F. Berger, Köln-Riehl, Ehrenbergstraße 1. Nachdruck nur mit Genehmigung der Schriftleitung. — Bezugspreis: Vierteljährlich 1,50 DM zuzüglich —,12 DM Zustellungskosten. Erfüllungsort ist Limburg/Lahn. — Alle Zuschriften für die Redaktion an Joseph F. Berger, Köln-Riehl. Bestellungen und Anschriftsänderungen nur an die Limburger Vereinsdruckerei GmbH., Limburg/Lahn, Diezer Straße 17. Postscheck-Konto: Frankfurt am Main, Nr. 123 82, Bank-Konten: Limburger Bank, Kreissparkasse Limburg, Nassauische Landesbank, Filiale Limburg.